

TEA-BULTENO

10^A JARO

JANUARO - FEBRUARO 2007

NUMEROJ 1-2



Bonan Bonan Bonan!

Nova Jaro, novaj ideoj, novaj esperoj! Jes, esperi, bela vorto, laŭ PIV, signifanta “atendi, kun fido, la realiĝon de io kion oni deziras”. Do, kion ni esperas? Ĉu gajnon en loterio? Ĉu malaltiĝon de impostoj? Ĉu eltrovon de rimedo kontraŭ maljuniĝo? Ni forgesu pri tiaj materiaj aferoj, rigardu profunden en ni mem kaj malkaŝu niajn aŭtentikajn sentojn.

Niaj veraj esperoj, post prijuĝado de la pasintecaj okazaĵoj, apartenantaj al nia vivo aŭ al tiu de niaj prauloj, kuŝas en niaj klopodoj solidarece helpi la suferantojn, precipe virinojn kaj infanojn kiuj tra la mondo senas je ĉia bezonataĵo kaj estas ekspluatataj laborakampe, batali per pacarmiloj por respekto de ĉies homrajtoj kaj demokratio ankaŭ en la lingva kampo, lukti kontraŭ malsato, mizero, militoj, maljustecoj, poluciado kaj neniigado de Naturo, ... Oni ne devas tro malproksimiĝi por spekti malindajn situaciojn: sufiĉas ioma atentemo, kaj oni eĉ trovos helpbezonanton tute najbare. Kaj ne malesperu, kiam vi ne vidos tujan rezulton, respondan al via klopodado: tiu, kiu semas kaj semas konstante, tiu certe iam rikoltos abunde! Nu, ek al laboro, kuraĝe antaŭen kaj ne flankiĝante: la mondo estas tia, sed per nia agado, nia simpla, laŭ nia povo, sed konkreta agado ankaŭ ni povas esti kapablaj iel kontribui al plibonigo de la tuthomara situacio! Havu bonegan, sukcesoplenan kaj fruktodonan 2007^{an} jaron!

Via redaktanto *Fida*

lam en Triesto...

Traserĉante inter polvoplenaj libroj ĉe antikvaĵejo, el malnova ĉeflibro de fama triesta firmao, komence de la pasinta jarcento, elsaltis tiu ĉi

nektima dokumento. Ĝi estas atente traleginda, ĉar montriĝas, ke ŝajne, dum la “avinaj tempoj”, ne ĉio estis pli bona ol hodiaŭ ... Ĉu ne?

Trad. Viglo.



Regularo

1. La oficistoj devige balau la plankojn ĉiumatene, kaj senpolvigu la meblojn, bretarojn, montrofenestrojn.
2. Ĉiutage ili devige plenigu la petrolo-lampojn, purigu ties ĉapelojn kaj reguligu la meĉojn, kaj unufoje dum semajno lavu la fenestrojn.
3. Ĉiu oficisto devas porti unu sitelon da akvo kaj unu da karbo por la taga neceso.
4. Tenu plumojn tre zorge; tamen ĉiu rajtas akriĝi la plumbekojn laŭ propra emo.
5. Tiu ĉi oficejo malfermiĝas je la sepa matene kaj fermiĝas je la oka vespere, krom dimanĉe, kiam ĝi estas fermita. Ni atende esperas, ke ĉiu oficisto pasigos dimanĉon, sin fordonante al preĝejo kaj libere partoprenante en la aferoj de Dio.
6. La viraj oficistoj ĝuos unu liberan vesperon ĉiusemajne cele al distriĝo kaj du liberajn vesperojn, se ili regule vizitadas preĝejon.
7. Post kiam oficisto estis laborinta dum dektri horoj en la oficejo, li devos trapasigi la restantan tempon legante la Biblion aŭ aliajn klerigajn librojn.
8. Ĉiu oficisto devas rezervi rimarkindan parton de sia salajro por la jaroj de maljuneco, tiel ke li ne fariĝu ŝarĝo por la komunumo.
9. Ĉiu oficisto, kiu fumas hispanajn cigarojn, uzas likvorojn je iu ajn formo, vizitas bilardejojn aŭ publikajn salonojn, aŭ iras ĉe barbirejo por sin razigi, donos al ni bonan kialon por suspekti pri lia valoro, pri liaj intencoj, pri liaj integreco kaj honesteco.
10. La oficisto, kiu estos plenuminta propran laboron fidele kaj senerare dum kvin jaroj, akiros pliĝon de salajro je 5 centimoj tage, se entute tion permesos la profitoj de la firmao.

Januara Programo	
04 - ĵaŭdo	17h30 - Di-servo ĉe Preĝejo Beata Virgulino de l'Rozario
09 - mardo	20h00 - Prelego itallingva de la baha-ano prof-ro MASRUR Imani pri: "Progressività della religione"
12 - vendredo	20h00 - Krucvortoj en Esperanto
14 - dimanĉo	10h00 - JARA ASEMBLEO DE TEA
16 - mardo	20h00 - Esplorado en arkivo por preparo de libro pri Historio de TEA
19 - vendredo	20h00 - Verboj kun prepozicioj aŭ afiksokoj: tradukado al itala
23 - mardo	20h00 - Esplorado en TEA-arkivo
26 - vendredo	20h00 - <i>Lecturae Dantis</i> Esperante, itale kaj triestadialekte
30 - mardo	20h00 - Esplorado en TEA-arkivo
Febrauara Programo	
02 - vendredo	20h00 - Prelego itallingva de la baha-ano prof-ro MASRUR Imani pri "Perchè essere religiosi"
06 - mardo	20h00 - Esplorado en TEA-arkivo
09 - vendredo	20h00 - Verboj kun prepozicioj aŭ afiksokoj: tradukado al itala
13 - mardo	20h00 - Esplorado en TEA-arkivo
16 - vendredo	20h00 - <i>Lecturae Dantis</i> Esperante, itale kaj triestadialekte
20 - mardo	20h00 - Esplorado en TEA-arkivo
23 - vendredo	20h00 - Vojaĝo al Sicilio - prezentas Elda kaj Pino
27 - mardo	20h00 - Esplorado en TEA-arkivo
Unuagradaj kursoj okazas ĉiujŝaŭde kaj -vendrede ekde la 18h00	

39^a Ĝemajno de Internacia Amikŝeco 19-25 februaro 2007 en Triesto

Pasintjare, celebre de la 100-jariĝo de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO, oni lanĉis Internacian Konkurson, pri kurtfilmoj ital- kaj/aŭ esperant-lingvaj, aŭ alilingvaj sed kun surskribaĵoj en la itala aŭ esperanta lingvoj. Daŭro de la filmo, en formo de DVD aŭ VHS, devas esti maksimume 15-minuta. Verkoj jam alvenis kaj ankoraŭ pliajn ni atendas. Espereble ili atingos nin ĝustatempe, ĉar la prezentado al publiko okazos en kadro de la 38^a SIA.

Aljuĝos la premion al la unuaj tri klasifikintaj ĵurio konsistanta el 5 personoj, elektotaj, kaj el la ĉeestonta publiko. Regularo, aliĝilo kaj aliaj informoj haveblas ĉe www.blog.ialweb.it/esperantotrieste/ aŭ ĉe la grupa ttt-ejo: it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina, ĉe ttt-ejo: www.esperanto.it, aŭ kontaktante noredv@tele2.it. Pri ĉiuj aliaj detaloj oni estos ĝustatempe informitaj.


Solena Meso
en Esperanto
**Preĝejo BEATA VIRGULINO
DE L' ROZARIO**
Piazza Vecchia - Trieste
Ĵaŭdon la 4^{an} de januaro 2007
je la 17h30
Kuncelebrantoj:
Don Antonio Dessanti
Pastro Johann Ammer
Don Nello Marcuzzi
Akompanos la Di-Servon
la virvoĉa koruso MAX REGER,
direkte de
M^o Bruno De Caro

Pludaŭras la atencoj kontraŭ la itala lingvo

*La Itala Poŝto inter la plej kreemaj:
jen la ital-angla lingvo (italenglish)*

Se la Poŝtoj intencas ion restrukturi aŭ plibonigi, oni aŭŝas la sekvan mesaĝon: "Realigo de novaj layout", elektante tiel ne komunzan terminon, nekonatan al la plejmulto, kio tradukita egalas al "distribuo de areoj, modeloj(?)" kaj kio, laŭdire de la poŝta responsularo, signifus: "novan oficejon", polucianta tiamaniere ne nur la italan, sed ankaŭ la anglan lingvojn.

Enirante iun ajn Poŝtoŝtacion, okulfrappe altiras la atenton la jenaj skribaĵoj: → *business*, kiu aldirektas al sektoro por priveligitaj klientoj; → *Postepay*, koncernanta kreditkartojn; → *Posteshop*, rilate al aĉetumado de aĵoj detaligitaj en tre vari-riĉa katalogo, kie i.a. troveblas - miru, miru!! - "was ist das", anstataŭ "vasistas" (klapo de fenestro aŭ de leterkesto); → *Postedays*, kio rilatas (laŭ iliaj intencoj) al tiu periodo, dum kiu la oficistaro estas engaĝita merkatiki ("umi marketing") por altiri klientojn al poŝtvara aĉetado (*shopping*). Sed ankoraŭ ne finiĝas la neniigo de la itala lingvo fare de la brile inteligenta poŝta direktoraro nuntempa.



Per “servordono”, n-ro 34/06 - Prot. 51/2006, kies objekto estas “Organiza strukturo”, fakte la Italaj Poŝtoj, celante <favori la disvastigon de la organizcela kulturo, alprenante universale konatajn terminarojn ene de *business* ... kaj certigi plenan kompreneblecon de la organiza modelo al ĉiuj koncernaj *stakeholders* ...> zorgis <alinomigi la diversajn organizajn funkciojn de la agentejo kaj asigni al la sekvaj *job title* (ŝajnas spritaĵo, ĉu ne?) la alligitajn respondecajn taskojn>.

Al tio sekvas listo de la diversaj funkcioj ĉe kies flanko staras la diversaj *job title* Vice President, Executive Vice President e Senior Vice President:

Strategic Planning, Chief Financial Office & Operational Planning, Human Resources Organization, Chief Information Office, Internal Auditing, Legal Affairs, Corporate Affairs, Communication & Advertising, Security & Safety, Purchasing, Business Unit BancoPosta. Business Unit Mail, Business Unit Express and Parcels, Business Unit Philately, Chief Network and Sales Office, Chief Operating Office.

La *job title* de tiu kiu elcerbigis ĉi servordonon (vulgare konata kiel “delegita administranto”) estas kompreneble la **Chief Executive Officer**. La angla estas tre bela lingvo, sed kial tiamaniere ĝin mis- kaj fuŝuzadi, ankaŭ por tiele polucii la italan?

Bedaŭrinde ekzistas ankoraŭ pliaj ekzemploj, kiaj **question time, welfare, legge della privacy**, kiujn oni altrudas al ni de la alto kaj certe ne bone ekzemplas, tiel neniigante la efikojn de la alvokoj cele al respekto de la lingvo de *Dante Alighieri* kaj de aliaj asocioj kiel Alarmino Lingvo (*Allarme Lingua*)

Giorgio Bronzetti—DISVASTIGO Presagentejo

Jen pri ĉi absurdaĵo, komento de Viglo **Al plifortigo de la poŝtaj servoj en Italio.** **Interesaj novaĵoj.**

Bone, eĉ bonegege! Jam larĝe dismalfermiĝis la vojo kiun laŭiros la itala popolo kun la specifa celo eminenti en la mondo, ree konkeri tiun supran lokon, indan je la itala gento, kaj, definitive, por niaj posteuloj estas pretigota estonteco ĝojoplena.

Genia, troflatema, burokrato malkovris, ke la nura uzado de la angla lingvo, por difini taskojn kaj kompetencojn de la oficistoj, ja sufiĉas al *Poste italiane* por leviĝi glorie al la plej altaj pintoj de efikeco kaj produktiveco, sen ia ajn interveno de maldeciaj ministeriaj reformoj.

Spite al protektado de nia kulturo.

Per tiu novaĵo, leteroj senditaj per “prioritata poŝto” alvenos la tago antaŭ ties sendado kaj telegramoj (nu, kio estas tio?) estos eltombigitaj kaj atingos la celiton eĉ tri tagojn antaŭe, tiel senkompate estos venkita Interreto.

Sed, amikoj, ne tro ĝojekscitiĝu! Tra delira postmodernisma engaĝado emanta montri, ke ŝajno valoras pli ol substanco – surbaze de la tre aktuala kaj fama “virtuala realo” – kio estas nenio alia ol kroma atako al la itala lingvo – kiun per siaj “vanaj vokoĵ” intencus defendi la nun jam antikviĝanta “*Accademia della Crusca*” – laŭ tiu longa vojo al la novkoloniismo – lingva, arta kaj materia – kien ni fatale estas glitantaj, jam delonge, sen ies reago aŭ protesto.

Kiel ajn, ni esperantistoj esperas... Ĉiam!

Ho Chi Minh kaj Esperanto

Ho Chi Minh estis granda patrioto kaj revoluciulo de Vjetnamio. Li vivis, laboris kaj dediĉis sin al revoluciaj aktivadoj en multaj landoj: Francujo (1911, 1917-1923), Usono (1912-1913), Anglujo (1914-1917), Rusio (1923-1924, 1933-1938), Ĉinio (1924-1927, 1931-1933, 1938-1941), Germanio (1928), Italujo (1928), Tajlando (1929-1930). Krome, li venis en multajn landojn de Azio, Afriko, Eŭropo, Sud-Ameriko kaj Oceanio.

Ĉiam starigante intimajn rilatojn kun lokanoj ĉie, kie li estis, Ho Chi Minh senĉese studis lokajn kutimojn, atente serĉe esploris revoluciajn spertojn kaj diligente lernis nacilingvojn.

En 1935, en la Kvina Kongreso de Kominterno, kiu okazis en Rusio, respondinte la demandon de la organiza komitato “Kiujn lingvojn vi scias?” li skribis en la deklaro: “La francan, anglan, ĉinan, germanan, italan, rusan kaj vjetnaman”. Fakte li scipovis pliajn, ekzemple: la hispanan, tajlandan kaj aliajn. Ho Chi Minh uzis tiujn ĉi lingvojn por verki gazet-artikolojn, novelojn, poeziojn, eĉ dramon.

Nuntempe, surbaze de fidindaj fontoj de informado mi malkovris, ke li sciis ankaŭ Esperanton, kaj Ho Chi Minh reale estis esperantisto. De 1914 ĝis 1917 Ho Chi Minh vivis en Anglujo. Krom la anglan lingvon, li lernis ankaŭ Esperanton, partoprenis la sindikatan movadon kaj la skoltisman organizon de Anglujo. Tiutempe anglaj skoltoj ŝatis paroli Esperanton en siaj kunsidoj kaj renkontiĝoj.

Post la Aŭgusta Revolucio de 1945 krom la francan, anglan kaj ĉinan, la Radiostacio de Vjetnamio uzis ankaŭ Esperanton por elsendi siajn novaĵojn tra la mondo. Prezidento Ho Chi Minh sugestis al tiama direktoro de “Voĉo de Vjetnamio”, ke Esperanto, krom aliaj lingvoj, estu utiligata por disvastigi tra la mondo la “Deklaracion de Sendependado” de Vjetnamio.

Tiamaniere Vjetnamio estis la unua azia lando uzinta la internacian lingvon sur la ondoj. La ĉiutaga radioelsendo en Esperanto daŭris de septembro 1945 ĝis la eksplodo de la agresmilito far la francaj koloniistoj en Vjetnamio en decembro 1946.

En 1954, post la subskribo de la Ĝeneva Konvencio por paco en Hindoĉino, internacia kontrolo delegacio konsistanta el reprezentantoj de Hindio (Prezidento), Kanado (membro) kaj Pollando (membro) alvenis Vjetnamion por efektiviĝi sian funkcion. La delegacio estis akceptita de Prezidento Ho Chi Minh. En tiu renkontiĝo Prezidento Ho parolis angle kaj france kun la gastoj. Turninte sin al polaj delegitoj, li subite demandis: “Ĉi tie ĉeestas reprezentantoj de Pollando, la patrujo de Doktoro Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo. Do, kiu el vi povas paroli Esperanton?”. Du el ili levis siajn brakojn. Ho Chi Minh montriĝis ĝoja kaj de tiu ĉi momento li babiladis kun tiuj poloj en Esperanto.

En 1956 eminenta vjetnama esperantisto, ambasadoro Nguyen Van Kinh (kiu poste fariĝis Honora Prezidento de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio) demandis la opinion de la Prezidento Ho Chi Minh pri la intenco fondi Esperanto-Asocion en nia lando, li tuj respondis “Necesas ekfari tiun laboron. Mi subtenos vin !”

Nguyen Van Kinh krome rakontis, ke Ho Chi Minh

fojfoje donis sian opinion, i.a. ke “Esperanto estas belsona lingvo”

Konvinkite pri la literatura kapablo de Esperanto, en 1960 Ho Chi Minh konsentis, ke la eminenta esperantisto kaj poeto Dao Anh Kha – nuna akademiano de Esperanto – traduku lian poemkolekton “Tagkajero en Prizon”. Fakte tiu ĉi bela kaj fidela traduko estis ŝatata de la esperantista publiko en diversaj landoj.

En 1968, unu jaron antaŭ sia morto, dum vizito al aviadistoj de la Popolaj armeformoj de Hanojo, en intima konversacio Ho Chi Minh foje klarigis al ili pri Esperanto. Li diris: “Ĉiuj nacioj, krom sian patrinan lingvon, povas lerni nur Esperanton por egalrajte kontaktiĝi unu al la alia. Esperanto estas facila por la ellernado kompare al la nacilingvoj”


Tiuj ĉi faktoj ja igas fieraj ĉiujn adeptojn de Zamenhof en nia lando. Nia granda gvidanto, nia karega onklo, kiun UNESKO honoris kiel “heroo de naciliberigo kaj homo de kulturo” (okaze de la centjara datreveno de lia naskiĝtago en 1990) estis ne nur varma subtenanto, helpanto de la Esperanto-Movado, sed ankaŭ esperantisto, foje uzanta la internacian lingvon dum sia revolucia agado.

Okaze de la Kvinkdekjara Jubileo de la Vjetnama Esperanto-Asocio (1956-2006)

Tran Quan Ngoc Vjetnamio

... kaj ankoraŭ ion alian, tre interesan, pri tiu belega Lando!

Tay Nguyen – gongoj, kultura heredaĵo de la homaro



En 2005, la vjetnamaj gongoj de Tay Nguyen (Altaj Ebenajoj de la Centro) estis oficiale agnoskitaj de UNESKO kiel nemateria kaj buŝa kultura heredaĵo de la homaro. Tio okazis kelkajn monatojn post kiam la sama organizo agnoskis kultura heredaĵo ankaŭ la muzikon de Hue-Kortego.

Ne sciatas, kiam aperis la gongoj sur tiu suna kaj venta grundo de Tay Nguyen. Oni supozas, ke ili naskiĝis dum la periodo de dongson-a kulturo, konata pro siaj bronzaĵ tamburoj, 3500-4000 jarojn antaŭe. La kulturo de gongoj disvolviĝis en la provincoj de Kon Tum, al Lai, Dak Lak, Dak Nong kaj Lam Dong kie vivas la etnoj Bana, Xedang, Mhong, Koho, Romam, Edê, ... La gongoj estas integra parto de la ĉiutaga vivo de la Tay Nguyen-anoj. Per tiu ilo ili esprimas sian ĝojon kaj sian doloron. La gongoj resonas je la naskiĝo de infano, kuniras kun la mortintoj dum ties longa vojaĝo.

Ili ĉeestas ankoraŭ dum religiaj ceremonioj, geedz-igoj, festoj de la Novjaro, de la rizo nova, de la venko, por la celebrado de instalado de nova loĝejo, okaze de la foriro de la batalantoj al la fronto... Ili estas ankaŭ homa komunikilo kun okultaj fortoj. La Tay Nguyen-anoj kredas, ke malantaŭ ĉiu metala pleto troviĝas diaĵo. Ju pli malnova estas la gongo, des pli granda estas la diaĵaj potencoj. La gongo reprezentas altprezan bienon, la simbolon de forteco kaj de prospero. Iam unu gongo valoris 2 elefantojn aŭ 20 bubalojn. Dum festotagoj, la spektaklo de vilaĝanoj dancantaj ĉirkaŭ sankta fajro laŭ la ritmo de la gongoj, kies sonoj eĥas de montaro, enhavas ion romantikan kaj fantastan. La gongo estas ankaŭ prikantita en epo-

peoj, en poemoj. Jen fragmento de Dam San-epopeo kie estas priskribita la sono de gongo:

“Resonu la plej sonoraj gongoj, la plej basaj gongoj. Frapi delikate, por ke la vento alkonduku la sonon al la grundo. Frapi tiamaniere, ke la sono de gongoj aŭdiĝu en la tuta regiono. Frapi tiamaniere, ke la sono de gongoj glitu tra la planko kaj resonu fore. Frapi tiamaniere, ke la sono de gongoj forfuĝu el la fajrejo kaj plenigu la aeron. Frapi tiamaniere, ke la simio malprenu la branĉon kaj falu surteren. Frapi tiamaniere, ke la demono, tute atenta, forgesu fari malbonon al la homo. Frapi tiamaniere, ke la sciuro forgesu fosi sian ŝirmejon, ke la serpento restu najligita sur la loko mem, ke la leporo eksaltu, ke la cervo forgesu paŝtiĝi, ke ĉiuj aŭskultu atente la sonojn de Dam San-gongo...”

Ĉiu vilaĝo de Tay Nguyen havas sian gong-orkestron. Ekzistante ekde miloj da jaroj, la gong-arto ja atingis altan nivelon, karakterizita per sia altvaloreco kaj diverseco. Ĉiu etno, ĉiu regiono havas siajn apartajn trajtojn. Oni povas ludi gongon sola aŭ en orkestro. Unu grupo da gongoj konsistas el 2 ĝis 12 iloj, kelkfoje el 18 ĝis 20 kiel ĉe la Ĝaraj-anoj, kaj povas ludi polifoniajn muzikaĵojn. En perfekta kombinaĵo de sonoj, la gongoj fariĝas harmonia koncerto. Ĉiu etno havas siajn proprajn muzikpecojn. Proklamante la Tay Nguyen gong-kulturon nemateria kaj buŝa kultura heredaĵo de la homaro, dum solena ceremonio s-ro Koichiro Matsuura, Ĝenerala Sekretario de UNESKO, sin esprimis jene: “Mi konatiĝis kun tiu vjetnama specifa muzika genro kaj mi vidis tre originalajn muzikilojn de la Tay Nguyen-etnoj. Tio estas tradicia kultura trajto propra al Vjetnamio, samtempe mirinda kaj distinga. La Tay Nguyen gong-kulturo merite ricevis la titolon de nemateria kaj buŝa kultura heredaĵo de la homaro”.

Esperantigis: Xuan Thu El Monda Mozaiko – www.edukado.net

Fonto: Vietnam Pictorial

Poŝtmarko “Esperanto-Zamenhof” en Israelo

La emisio okazis la 17^{an} de decembro 2006. Sur la poŝtmarko aperas portreto de L. L. Zamenhof dezajnita ene de Esperanto-teksto. Samtage aperis unuataĵa porokaza stampo (interalie sur UTK), kaj ankaŭ memorfolio, kiu surhavas la samajn poŝtmarkon kaj stampon.

Menciindas, ke la Israela Filatela Servo akceptis la peton aperigi poŝtmarkon okaze de la 120^a datreveno de la naskiĝo de Esperanto kaj la 90^a datreveno de la forpaso de Zamenhof precipe danke al klopodoj de la israela esperantistino Malka Zemeli.

Pri la rilatoj kun la emisianta instanco respondecas Jehoŝua Tilleman, ĉefdelegito de UEA en Israelo, kiu okupiĝadis kune kun Malka Zemeli pri ĉiuj teknikaj detaloj kaj daŭre okupiĝos pri la disvendado de la poŝtmarkoj kaj la kromproduktoj inter la esperantistoj.

Gratulojn al la iniciatintoj, kiuj neniam perdis la fidon kaj insiste, konstante, pacience klopodadis ĝis atingo de sia celo!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it

Grupa tt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristina

Poŝta adreso: CP 601 c/o Ufficio Postale Trieste Centro

IT-34132 Trieste - Italia

Poŝtĉekkonto N° 10834349

ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 14^{an} de januaro 2007 je la 10.00 en unua kunvoko kaj respektive je la 10.30 en dua kunvoko**. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2006:
 - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*)
 - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*)
 - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Giuseppe Valle*)
 - ĉ) Raporto pri la libro-fako (*Giuseppe Valle*)
 - d) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Elio Nocent*)
 - e) Raporto de la triesta katedro (*Elda Doerfler*)
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

DELEGILO

La asocio _____
estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon
la 14^{an} de januaro 2007.

Subskribo _____

Dato _____

Notu bone! Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI-kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn de LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).